

# La dentobroso de Mupo

## Rakonto por infanoj

Erik Tantal





# La dentobroso de Mupo

## Rakonto por infanoj


Erik Tantal

# Enhavo

Dolĉaĵoj....................................................................................3
Bonaj konsiloj.........................................................................6
Dentodoloro...........................................................................10
En la arbaro............................................................................14
En la kavo...............................................................................17
La dentobroso.........................................................................22
Malgranda pikniko..................................................................29
Granda pikniko.......................................................................34
Postparolo...............................................................................39
Kolofono.................................................................................41

# Dolĉaĵoj

Mupo loĝas en eta ligna kabano ĉe rando de la arbaro. Li sidas en la kuirejo. La fenestro estas vaste malfermita ĉar li atendas la ĝirafon Neo. Ĝi venas ĉiutage je la sama horo kaj alportas bongustajn dolĉaĵojn.



Per sia longa kolo ĝi tiras malgrandan ĉaron en kiu amasiĝas bombonoj, kukoj kaj ĉokolado.

Mupo aŭdas ke Neo vokas de malproksime:

"Frandu, frandu, frandu! Nun venas la bongustaj dolĉaĵoj!"

"Bonvolu doni al mi grandan sakon. Tiu de hieraŭ jam malpleniĝis. Ĉio, kion vi alportas ja vere bongustas!"


Tio okazas ĉiutage. Mupo simple ne povas kontraŭstari tiun tenton. Li frandas kaj frandas. Dum tio li iĝas pli dika kaj pli peza.

Lia amiko Bama provas konvinki lin partopreni piedpilkadon:

"Nun ek el via kabano! Ni bezonas vin. Vi ja estas bona futbala golulo."

"Ne, ne, hodiaŭ ne. Mi estas ja tiel laca."

En la granda skatolo troviĝas ankoraŭ unu bongusta ĉokolada briko. Ankaŭ ĝi plene malaperas hodiaŭ en la stomako de Mupo. Poste li frue enlitiĝas.



# Bonaj konsiloj

"Hola, Mupo. Bone, ke mi povas viziti vin denove. Kion vi faras dum la tuta tago?", demandas Sekuo, la saĝa gufo.

"Ah, nenion specialan. Tion kaj tiun. Ĉu vi ŝatas manĝi marcipanan kukon? Bedaŭrinde la kesto estas preskaŭ malplena. Servu vin mem. Mi volas ankoraŭ iomete ripozi ĉi tie", plendas Mupo kaj restas sidanta sur la sofo.

Sekuo miras pri tio. Kio okazis al li? Ĉu li eventuale malsaniĝis?

Subite Neo frapas je la fenestro.

"Tute novaj dolĉaĵoj! Bongustaj, bongustaj. Mupo, leviĝu kaj plenigu vian keston!"

Sekuo malfermas la fenestron kaj forpelas la ĝirafon.

"Foriru kun via ĉaro. Ni ne bezonas tion!"

Mupo provas ankoraŭ haltigi ĝin sed li estas tro malrapida. Neo jam pluiris kun siaj dolĉaĵoj.

Sekuo komencas bruske paroli kun Mupo.

"Do, tiel. Nun mi komprenas vian problemon. Vi sidas la tutan tagon antaŭ tiu kesto kaj daŭre frandas. Ne estas mirege ke vi ĉiam iĝas maldiligenta. Ĉu vi eĉ scias kiel malsanigaj estas tiuj dolĉaĵoj?"

"Kial malsaniga?", demandas Mupo nekredeme.


"Se vi nur manĝas dolĉaĵojn via korpo ne ricevas sufiĉajn nutrajn substancojn. Tiuj estas bezonataj por esti forta kaj sana:"

"Nutraj substancoj, kio estas tio?"

Sekuo ridetas kaj pacience klarigas: "Nutraj substancoj estas kiel konstrubriketoj, kiuj helpas vian korpon kreski kaj resti forta kaj havi sufiĉan energion. En manĝaĵoj kiel fruktoj, legomoj kaj tutgrajna pano troviĝas multaj de tiuj nutraj substancoj. Ili tenas viajn muskolojn kaj ostojn fortaj kaj vian cerbon bone funkcianta."

"Sed kial dolĉaĵoj estas tiel bongustaj se ili ne estas bonaj por mi?"

Sekuo respondas: "Tio estas pro la sukero. Se vi tro multe manĝas ĝin, viaj dentoj povas malsaniĝi."



Mupo malrapide kapjesis, sed li ne tute kredas ĉi tion. Tuj post la foriro de Sekuo li prenas la tri lastajn bombonojn el la kesto kaj metas ilin kune en sian buŝon.

# Dentodoloro


Mupo ne zorgas pri la konsiloj de Sekuo. Li daŭre frandas de la dolĉaĵoj, kiujn Neo deponis antaŭ la domo. Sed iun tagon, kiam li ĵus manĝetas gluecan karamelbombonon, akra doloro pikas lin.

"Aŭtŝ. Tio doloregas!", li vokas kaj tuj elkraĉas la bombonon.

La maldekstra vango de Mupo sentiĝas kvazaŭ ĝi volas eksplodi. Estas kvazaŭ eta koboldo dancas en lia buŝo batante sur unu de liaj dentoj per fera martelo.

Mupo ne povas plu maĉi kaj krome havas malfacilecon paroli.

Kun larmoj en siaj okuloj li vokas la lertan korvon Borge kaj petas lin por helpo.



Borge vere maltrankviliĝas pri sia amiko.

"Mupo, tio estas dentodoloro. Tio povas esti tre tre aĉa. Vi devas tuj kontakti la saĝan gufon Sekuo. Li certe povas helpi vin."

Mupo kapjesas. Kun larmoj en la okuloj li ekiras por renkontiĝi kun Sekuo. Ĉu li ne donis multajn konsilojn pri saniga manĝaĵo dum la lasta vizito?

Jes, Sekuo scias. Li ja estis avertinta lin. Tial li diras tre sincere:

"Kara Mupo. Vi mem kulpis. Mi nur helpos vin, se vi donas al mi promeson."

"Jes, jes. Mi promesas ĉion kion vi volas. Se nur tiu aĉa doloro malaperas!"

"Vi devas promesi ne plu frandi tiel ofte. Maksimume unu bombono aŭ unu eta ĉokolada peco je unu tago!"

Mupo konsentas. Li ĝojas ke Sekuo helpas.

"Bone. Nun tuj ekiru kaj vizitu doktoron Chung, la dentiston, en sia kavo. Ĝi troviĝas en la arbaro. Tien vi devas iri."

Kaj Mupo tuj ekiras.

Estas longa vojo. Mupo rapidegas. La dento ankoraŭ doloras.

## En la arbaro

La suno brilas. La arboj bonodoras kaj sur la herbejoj floras buntaj floroj. Mupo ne atentas pri tio.

Subite Lulu, la eta sciuro, saltas trans la vojon antaŭ li kaj haltas.

"Kial vi aspektas tiel malĝoje, Mupo? Kio okazis?"


Mupo ĝemas kaj raportas pri siaj dentodoloroj al Lulu.

"Ho ve, kompatinda vi! Vi devas tuj iri al la dentisto. Li loĝas tie en sia kavo. Bonan sukceson al vi!"

Per tiuj vortoj Lulu malaperas kaj Mupo malĝoje daŭrigas sian vojon.


Post la sekva vojkurbiĝo li renkontas la kunikleton Riko. Ĝi saltetas ĝoje tien kaj reen mordetante la freŝajn herbojn. Sed ĝi ankaŭ rimarkas ke io ne estas en ordo kun Mupo.

"Kio okazis? Kial vi estas tiel malĝoja, Mupo?", ĝi zorgeme demandas.



Denove Mupo devas rakonti pri siaj dentodoloroj. Riko respondas same kiel Lulu. Mupo dankas kaj rapide daŭrigas sian vojon.

Finfine li atingas la kavon.



# En la kavo


Doktoro Chung, la dentisto, havas kuracejon en kavo. Tie estas komforte kaj varme kaj hele, ĉar grandaj lampoj pendas de la plafono. En angulo staras seĝo kun alta dorsa apogilo. Ĉirkaŭe troviĝas multaj strangaj aparatoj.

Mupo estas scivolema. La doloroj nun eĉ malpliiĝas. Doktoro Chung bonvenigas lin afable:

"Saluton, Mupo! Bonvolu sidiĝi sur la seĝo. Mi volas trovi la kaŭzon por viaj dentodoloroj."


Mupo grimpas sur la seĝon. Li estas tute ekscitita. Doktoro Chung portas blankan kitelon kaj gantojn. Li movigas la seĝon supren kaj malsupren. La apogilo kliniĝas antaŭen kaj reen denove.

Tio daŭras iomete ĝis doktoro Chung trovas la ĝustan pozicion por sia paciento.



Sur la pleto kuŝas diversaj iloj. Per eta spegulo, kiu havas mallarĝan tenilon, doktoro Chung rigardas en la buŝon de Mupo.

"Ne timu, mi jam trovis la problemon. Nun venas eta piko de la injektilo. Tiam mi povas repari la rompitan denton. Vi preskaŭ ne rimarkos tion."



Per la mallaŭta borilo doktoro Chung forigas la rompitan pecon de la dento de Mupo.

Tio vere ne doloras. Sed Mupo sentas, kiel la borilo laboras je lia dento.


Poste doktoro Chung plenigas la truon per substanco kiu rapide malmoliĝas. Dum tio Mupo devas teni sian buŝon vaste malfermita. Tio ne estas tiel facile. Sed doktoro Chung trankviligas lin:

"Baldaŭ ĉio estas preta. Mi nur devas purigi kaj poluri ĉion."

Mupo profunde enspiras. Kia feliĉo ke ĉio estas nun preskaŭ preta. Dum la polurado Mupo sentas fortan vibradon. Sed tio ne doloras. Li rajtas nun trinki akvon kaj forlavi kelkajn pecetojn. Tiam doktoro Chung donas al li spegulon. Per tio li povas rigardi la riparitan denton. Mupo brilas pro ĝojo kaj kore dankas sian dentiston.

Doktoro Chung ridetas kontente kaj diras:

"Nun vi devas ankoraŭ iri al Aliki. Ŝi notos la datumon, kiam vi revenu. Mi ja volas kontroli viajn dentojn. Kaj pripensu tion: Estas tre grava afero: Gardu viajn dentojn kaj prizorgu vian sanon!



## La dentobroso

Mupo gaje forlasis la kavon. Ne plu estas dentodoloroj. Ekstere atendas lin la lerta korvo Borge.

"Kra, kra. Malfermu vian buŝon. Mi ja ne havas dentojn, sed mi volas rigardi la viajn."

Mupo fiere montras per sia fingro al la loko, kie doktoro Chung faris la riparadon.

"Informu la aliajn. Morgaŭ ni ĉiuj kunvenos sur la granda herbejo", vokas Mupo kaj Borge forflugas kiel sago.

Sur la herbejo ili jam atendas. Lulu la malgranda sciuro, Riko, la kuniklo, Taŭrolo, la dika bovo, Amal, la malgranda elefanto kaj Bamo, la klaskamerado de Mupo. Ĉiuj laŭte aplaŭdas kaj Mupo devas

detale raporti pri tio, kio okazis en la kavo de doktoro Chung.

Poste ĉiu volas rigardi la riparitan denton. Mupo volonte malfermas sian buŝon.

"Kio estas tio? De kie venas tiu stranga odoro?"

"Jes, tio vere malbonodoras!"

Mupo eĉ ne scias, kion la aliaj volas diri. Ili ĉiuj montras strangajn mienojn post rigardi lian denton. Kaj tiam ili rapide adiaŭas kaj foriras.

Mupo malĝoje postrestas. Li ja tiom antaŭĝojis pri la granda kunveno. Kaj nun ĉiuj estas for. Penseme li forlasas la grandan herbejon.

"Saluton, Mupo. Kio okazis? Ĉu vi havas dentodolorojn denove?", demandas Aliki, kiu renkontas lin sur la vojo.


Mupo rakontas al ŝi pri la kunveno sur la granda herbejo kaj demandas:

"Ĉu vi komprenas, kial ili ĉiuj forkuris?"

Aliki jam povas imagi tion. Mupo verŝajne ankoraŭ neniam brosis siajn dentojn. Tial tiu malbona odoro eliras el lia buŝo. Sed ŝi volas ĝojigi lin sen skoldi. Tial ŝi malfermas sian dorsosakon kaj donas al Mupo etan skatolon.

"Kio estas tio?", demandas Mupo kaj tuj malfermas ĝin.

En la skatolo estas beleta dentobroso. Ĝi estas multkolora kun multaj brilantaj punktoj.



Aliki klarigas, ke Mupo nun devas purigi siajn dentojn post ĉiu manĝado. Tiam la dentoj povas longe resti sanaj kaj ne plu estos malbona odoro el la buŝo.

"Venu kun mi al la rivereto. Tie ni volas ekzerci la brosadon de la dentoj", ŝi proponas.

Aliki kunprenis propran dentobroson kaj ankaŭ tubon kun dentopasto. Ambaŭ trempas la brosojn en la klaran akvon kaj komencas la brosadon. Mupo tre atente rigardas kiel ŝi faras tion.

"Tio estas eĉ amuza", li vokas kaj ŝprucas freŝan akvon al Aliki.

"Mupo, nun prenu mian dentobroson kaj purigu miajn dentojn!"

"Ho, jes, Aliki! Malfermu vian buŝon tre vaste!".

Ambaŭ gaje ridas kaj Mupo ne volas ĉesi la brôsadon. Aliki tiam klarigas ke ne nur la purigado de la dentoj gravas.

"Venu morgaŭ denove al la kavo. Rekte apude troviĝas senarbejo. Mi invitas vin al pikniko en mia tagmeza paŭzo. Kaj ĉi tie mi ankoraŭ havas ion por vi."

Mupo denove ricevas skatolon. En tiu estas sablohorloĝo.


"Por kio estas ĉi tio?", demandas Mupo.

"Tio estas instrumento, kiu permesas mezuri la tempon."

"Kia tempo? Mi ne komprenas!“

"Dum vi brosas viajn dentojn simple starigu ĝin tiel, ke la sablo estas supre. Ĝi bezonas du minutojn por veni al la malsupra parto.

Tiam vi ĉiam scias, kiom longe vi brosis viajn dentojn", klarigas Aliki.



## Malgranda pikniko

Sur la senarbejo apud la kavo sidas Aliki jam sur granda tuko. Ŝi kunprenis etan kofron. En ĝi ne nur estas teleroj kaj  trinkujoj. Aliki preparis buntan salaton. Al ĝi apartenas bongusta saŭco kaj memfaritaj veganaj buloj.

Ŝi gaje mansvingas al Mupo vokante: "Venu ĉi tien, Mupo! Vi ja kuraĝe persistis kaj nun vi meritas rekompencon!". Mupo rapidegas al Aliki kaj eksidiĝas apud ŝi sur la tuko.


Subite la lerta korvo Borge surteriĝas apud ili.

"Kra, kra. Kion vi faras ĉi tie? Kial neniu invitis min partopreni? Kra, kra!"

"Bonvolu resti ĉe ni. Vi certe trovos ion, kio plaĉas al vi“, proponas Aliki.

Sed Borge jam forflugas.

En la salato, kiun Aliki preparis, troviĝas diversaj legomoj, ekzemple kukumoj, tomatoj, cepoj, ruĝaj, flavaj kaj verdaj paprikoj kaj karotoj. La salato aspektas tre apetitveka kun petroselo, baziliaj folioj kaj flavaj maizgrajnoj.



Mupo tuj gustumas kaj trovas la salaton bongusta. Ĉio estas freŝega kaj li devas ĝuste maĉi. Li neniam manĝis ion tiel bongustan. Sed li ankoraŭ ne provis la veganajn bulojn.


"Ho! Ili ankaŭ bongustas. El kio ili estas faritaj, Aliki?", li demandas.

Tion Aliki ne volas malkaŝi. Ŝi nur klarigas ke ene ne estas viando. Tiam ŝi klarigas al li, kiom grava estas, ĝui sanigan manĝaĵon por resti forta kaj sana. Se oni alkutimiĝas al tia manĝaĵo, oni ne plu bezonas dolĉaĵojn.

Je la fino ŝi ankoraŭ proponas ke Mupo partoprenu kuirklason. Tie li povas lerni, kiel tiaj menuoj estas preparitaj.

"Tien mi volonte iros", promesas Mupo, "sed unue mi devas brosi miajn dentojn".

Ĵus kiam li volas ekiri al la rivereto venas la amikoj de Mupo. Ili ricevis la novaĵon de Borge, ke ĉi tie estas io por frandi. Ne daŭras longe kaj ĉio, kio estis en la kofro, estas nun formanĝita. Tion Aliki kompreneble ne atendis.



"Kia domaĝo! Ĉio estas for. Tio tre bone gustis. Ĉu ni povas pikniki denove?", demandas Riko, la eta kuniklo.

"Kompreneble, jes. Ni kunvenu lundon en la venonta semajno. Tiam ĉiu mem kunportu ion", proponas Aliki.

Ĉiuj adiaŭas promesante reiri venontan lundon. Kaj Mupo finfine havas la ŝancon kuri al la rivereto por purigi siajn dentojn. Li eĉ kunprenas sian sabloholorĝon.

## Granda pikniko


Sur la senarbejo apud la kavo Aliki starigis longan tabulon, kiu kuŝas sur du dikaj ŝtonoj. Ĉi tie devas esti metitaj la bongustaĵoj unu apud la alia. Tiel ĉiu povas elekti tion, kion ili plej ŝatas. Sed ĝis nun prezentiĝas nur du teleroj.

Sur la unua kuŝas la fruktopikiloj de Aliki. Ŝi traboris etajn pecojn de melonoj, bananoj, kivoj kaj vinberoj per lignaj bastonetoj.

Mupo ne faris multan laboron. Sur lia telero kuŝas etaj nigraj buloj.

Subite alflugas Borge kaj kaptas unu el ili de la telero.

"Kra, kra. Tio bongustas. Sed kio estas tio, Mupo?"



"Vi ne devas ŝteli! Ili estas buloj el nigra pano. Mi formis ilin el mola pano. La kruston mi antaŭe forprenis kaj mem formanĝis. Mi tre ŝatas tion."

Nun venas pliaj teleroj.

Bamo alportas belajn etajn musojn. Li skulpis ilin el rafanoj. Unue li senŝeligis kelkajn rafanojn. Aliajn li dividis en maldikajn tranĉaĵojn. Ĉiu nun blanka rafana bulo estas la korpo de la muso. Flanke estas du fendetoj.


En tiujn Borge metis la maldikajn tranĉaĵojn por imiti la orelojn. Poste la musetoj ricevis nazojn kaj okulojn el sunfloraj kernoj.

Denove alflugas Borge kaj danĝerigas la plenigitajn telerojn. Mupo povas forpeli lin ĝustatempe.

"Vidu! Mi alportas tion", vokas Riko, la malgranda kuniklo.

Sur lia telero prezentiĝas pico el melono. Estas triangule tranĉitaj plataj pecoj de melono kovritaj per diversaj pecoj de aliaj fruktoj: bananodiskoj, pomringoj, fragoj kaj sekvinberoj.

"Vi vere multe laboris", proklamas Lulu, la sciuro, "por mi ĉio estis pli facila. Mi plenigis teleron kun juglandoj. Sed tiujn vi devas mem rompi, hi,hi,hi."



Kaj tiam aperas ankoraŭ pliaj teleroj. Amal, la malgranda elefanto, eĉ alportas grandan kuvon. Ĝi estas plenigita ĝis la rando kun bananoj.

Ĉiuj ĝojas pri la bongustaĵoj. Nur Neo, la ĝirafo, staras malĝoja je la rando de la senarbejo. Hodiaŭ neniu volas havi la dolĉaĵojn kiuj multas en la tirata ĉaro. Sekuo, la saĝa gufu, konsolas ĝin:

"Neo, tiu ne estas malbona. Vi nun komprenas ke ĉiu nur volas manĝi sanigajn manĝaĵojn. Tial vi devas ŝanĝi la enhavon de via ĉaro. Alportu ventontfoje simple freŝajn pomojn kaj pirojn. Tiujn vi certe ankaŭ ŝatos."

F I N O

# Postparolo

Post 'Mupo lernas', 'Mupo kaj Nabiko' kaj 'Mupo sonĝas' nun aperas la kvara rakonto pri Mupo.

Ĉiuj e-Libroj troviĝas sur mia hejmpaĝo. Tie ankaŭ prezentiĝas la versioj en la germana lingvo kaj la franca versio de 'Mupo lernas'.

Ĉiu, kiu volas, povas mem printi tiujn librojn kaj poste kolorigi la bildojn per krajonoj.

Por la rakonto 'La dentobroso de Mupo' mi akceptis kelkajn proponojn de ChatGPT. Estas mirinde ke artefarita intelekto kapablas produkti eĉ fantaziplenajn enhavojn. Ĉu eventuale ĝi nur trovis tion ie?

Grandan dankon al Michael kaj Robert, kiu helpis korekti kaj plibonigi la tekstojn.

Erik Tantal

Hamburg, 2023

# Kolofono


| | |
|---|---|
| **Titolo** | La dentobroso de Mupo |
| **Originala titolo** | Mupos Zahnbürste |
| **Versio 1.1** | 1-a Eldono, 2023 |
| **Aŭtoro** | Erik Tantal, alinome Klaus |
| **Traduko** | Klaus Friese |


| | |
|---|---|
| **Aŭtoraj rajtoj** | © Klaus Friese, Hamburg |


| | |
|---|---|
| **Retpoŝto** | friese@esperanto-hamburg.de |
| **Desegnoj** | Erik Tantal |
| **Hejmpaĝo** | esperanto-klaus.de |


# De la sama aŭtoro:




## Mupo lernas

Mupo tute ne volas esti en lernejo. Tial li fuĝas al la montaro. Tie li renkontas la grandan bovon Taŭro, la nigran korvon kaj aliajn bestojn.

Sed subite okazas akcidento kaj ĉio ŝanĝiĝas.





## Mupo kaj Nabiko

La trikrura Nabiko venas el la spaco de la fora planedo Nokaptota.

Bedaŭrinde okazis kraŝo kaj la kosmopramo estas nun en granda truo de la ĝardeno de Mupo.


Kiu povas helpi?




## Mupo sonĝas

Estas tro enuige ĉi tie!


Mupo plendas. Li serĉas ion interesan. Ĉu la mistera pentristo Suronkin povas helpi lin? Akompanu ni Mupon dum liaj sonĝ-vojaĝoj! Ek al la malmola nubo, fabela kastelo, pro-fundo de la maro kaj la alta montaro!




## Esperanto en la Kosmo

Televida elsendo en Esperanto disradiiĝis de la orbita stacio de la Tero. Kosmoveturilo de la planedo Heredo-156 kaptis la pro-gramon kaj sendis ĝin al la hejma planedo.

Ĉu la diversaj civilizacioj sukcesos pace kooperadi?




## Klaskunveno

Memoroj el lerneja tempo denove reviviĝas dum klaskunveno.

Kiel estis la jaroj en lernejo? Verdire, ni forgesis preskaŭ ĉion. Kaj ni ofte plibeligas la detalojn. Nur tre malmultaj restas vivantaj aŭ ne ŝanĝitaj. Eventuale ĉar ni ĉiam denove rakontas pri ili.

Kaj pliaj e-libroj troviĝas ĉe:

esperanto-klaus.de